

# LINGVA KRITIKO

STUDOJ KAJ NOTOJ PRI GRAMATIKO, VORTARO KAJ STILO

Gvidanto: Prof. D-ro B. Migliorini, LK., Ak. Cefredaktoro: Stefano La Colla, LK. Redaktoroj: Max Butin, LK.; Teo Jung; Robert Kreuz, LK.; Ing-ro R. Orengo, LK. Redakcio: ĉe S-ro Stefano La Colla, Via Dandolo 24, Roma (114), Italujo

VOL. I \* N-RO 8

MONATA ALDONO AL HEROLDO DE ESPERANTO

SEPTEMBRO 1932

## Esperantista Lingva Komitato kaj Akademio.

Por pli vaste konigi la laborojn de la Lingva Komitato kaj ĝia Akademio al la esperantistaro, ni represas ĉi-sekve, laŭ diversflanke esprimita deziro, la jarraportojn de la Esperantista Akademio kaj la raporton de la Direktoro de la Gramatika Sekcio. La ceteraj raportoj kaj la protokolo pri la kongresa kunsido de LK kaj ĝia Akademio en Parizo aperos en la oktobra numero de Lingva Kritiko.

### La Raporto de la Prezidanto de la Akademio

Ĉiujare antaŭiris la Raportojn de la Sekcio-Direktoroj. Bedaŭrinde en ĉi tiu jaro la Raporton ne povis fari nia Prezidanto mem, ĉar grava malsano provizore nebligis al li ĉiajn laborojn. Laŭ deziro de la Internacia Centra Komitato mi raportas en lia loko.

#### I.

Gravega perdo por la Lingva Komitato dum la lasta jaro estis la morto de nia Prezidanto Profesoro Théophile CART, la fidela gardanto de nia lingvo, kiu dum multaj jaroj modele direktis la Lingvan Komitaton kaj la Akademion.

Per la morto nin forlasis ankaŭ Barono de MENIL, kies nomo — jam pro lia kompono de la Himno — restos ĉiam honorata de la esperantistoj.

Pro diversaj kaŭzoj eliĝis el la Akademio ĝia Vicprezidanto Profesoro D-ro DIETTERLE kaj s-o MILIDGE. Danke ni memoras la valorajn servojn, kiujn ili faris por niaj lingvaj korporacioj.

Prezidanto de la Lingva Komitato kaj de la Akademio iĝis s-o J.M. WARDEN, ĝistiam Vicprezidanto.

La elekto de novaj Vicprezidantoj estis prokrastata, ĝis kiam la Akademio estos kompletigita post voĉdono pri la proponoj prezentitaj al la L. K. je la 15-a de junio 1932-a.

#### II.

De tempo al tempo oni legas kritikojn pri la Lingva Komitato. Estus neprudente, ilin ignori. Sed bedaŭrinde oni preskaŭ neniam legas iujn praktikajn proponojn por plibonigi tion, kion la kritikantoj malaprobas. Karakteriza por tio estis diskuto, kiun ankaŭ mi mem partoprenis, en la Heroldo de Esperanto (1928 n-oj 476, 479, 483, 485). Nun, en la sama gazeto (n-o 679 p. 3) iu B. K. plendas pri tio, ke kvankam li estas malnova, ne tute nekonata esperantisto, oni neniam lin demandis, kiun kandidaton li proponas por la L. K., ke li neniam vidis tiaspecan voĉdonilon kaj ke neniam li ĉeestis kunsidon, kiu pritraktis tiun ĉi aferon. Li demandas: Kiu estas sole tiel eminenta, ke li rajtas proponi aŭ elekti LK-anojn? Ĉu la jamaj LK-anoj? Ili — laŭ lia opinio — ne elektu sin mem, sed lasu la decidon al la vasta popolo esperantista.

Evidente la kritikanto ne konas la Regularon de la L. K., kies §§ 4 kaj 6 destinas:

La anoj de la Lingva Komitato estas elektitaj de la Lingva Komitato mem. — La proponoj pri novaj anoj venas, ĉu de la Propagandaj, ĉu de la Aplikaj kaj Specialaj Esperantistaj societoj kaj grupoj, ĉu de Lingva-komitatoj kaj de anoj de aliaj altaj Esperantistaj Institucioj. En ĉiu lando, la Akademio komunikas

la kandidatliston al la koncernataj naciaj asocioj, petante ilian opinion.

Do, se iu havas urĝan bezonon proponi iun kandidaton por la Lingva Komitato, li — se li mem ne estas membro de la L. K. aŭ de alia alta esperantista institucio — povas simple skribi leteron al tia membro aŭ al iu propaganda aŭ aplika aŭ speciala esperantista societo aŭ grupo de sia lando aŭ urbo, kaj li certe havos sukceson, se lia propono estas sufiĉe argumentita.

La konsilo, ke la „vasta popolo esperantista“ elektu la L. K.-anojn, estas tute malpraktika. Ni havas nek la organizajn rimedojn por konstati, kiu apartenas al tiu „popolo“, nek por kontroli la elektojn. Cetere ni povas esti konvinkitaj, ke la plimulto de la L. K.-anoj kapablas pli bone juĝi la lingvaj kvalitojn kaj meritojn de la kandidatoj, ol la „vasta popolo esperantista“, en kiu granda parto scias neniom aŭ nur malmulton pri la esperantistaj movado kaj literaturo kaj precipe pri la esperanta lingvoscienco.

Kiel en ĉiu homa organizaĵo, ankaŭ en niaj lingvaj institucioj povas okazi miselektoj, sed se efektive iam la taŭgeco de kvar aŭ kvin, eĉ dek inter centridok L. K.-anoj estus kontestebla, tio restus sen rimarkinda influo.

Tamen, por laŭeble eviti elektojn malproboblajn, oni povus antaŭ la elektoj publikigi aŭ almenaŭ komuniki al ĉiu tion petanta la liston de la kandidatoj. Tiel oni donus al la interesataj esperantistoj okazon por publike aŭ private sciigi al la L. K.-anoj, kiujn kandidatojn ili opinias netaŭgaj kaj kial.

#### III.

Pli konsiderindaj ol tiaj nesufiĉe pripensitaj esprimoj de kaŝnoma nekontenteco estas la proponoj de la „Unua Lingva Konferenco“ okazigita de la Internacia Cseh-Instituto dum Pasko 1932-a en Arnhem. En la rezolucio akceptita de tiu Konferenco ni trovas jenajn paragrafojn, kiuj koncernas la Lingvan Komitaton ĝenerale:

3. Konsiderante, ke la estonta sekureco de la lingva evoluo estas jam certigita, la Konferenco esprimas la deziron, ke la Lingva Komitato de nun funkcii kiel scienca korporacio koncentrigante sian klopodon al libera kaj senpartia esplorado de lingvaj bezonoj kaj provaj uzoj.

4. La Konferenco esprimas la konvinkon, ke la Lingva Komitato devas limigi sian konsiston al vere kompetentaj lingvo-konantoj kaj lingvo-uzantoj kaj ke ĝi ankaŭ devas pli severa apliki tiun paragrafon de sia regularo, kiu kontrolas la kunlaboran statistikon de la membroj. (VII. 9. 1.)

La unua deziro laŭvorte ŝajnas celi aliigon aŭ pli-

vastigon de la taskoj de la Lingva Komitato. Sed fakte jam ĝis nun la Lingva Komitato — kvankam preskaŭ nur per la Akademio — funkciis kiel scienca korporacio, kiu libere kaj senpartie esploris lingvajn bezonojn kaj provajn uzojn laŭ la §§ 1, 15 kaj 16 de la Regularo. Tial, antaŭ iuj decidoj, estus utile atendi de la iniciatintoj de tiu rezolucio pli precizajn klarigojn pri tio, kion ili rekomendas al la Lingva Komitato.

La dua deziro enhavas la neesprimitan riproĉon, ke la Lingva Komitato ĝis nun ne konformis al tiuj postuloj. Ĉar unuopaj faktoj, kiuj povus apogi tian kritikon, ne estas indikitaj, oni ne povas facile ekzameni ĝian pravecon. Sed se ĝi estas prava, la konkludoj de la Konferenco estas nepre ĝustaj kaj atentindaj. Certe la Estraro de la Lingva Komitato ilin zorge konsideros.

#### IV.

Aparte de l' Raporto de la Sekcio pri la Komuna Vortaro, estas dissendita nova listo de vortoj proponitaj por oficialigo porekzameno. Kiom ajn necesa estas konstanta plivastigo de nia oficiala vortrezoro, ni tamen konsciu, ke neoficialigo de taŭga radiko estas malpli granda malutilo ol oficialigo de ne nepre bezonata aŭ ne tute taŭga vorto.

Por ke kiel eble plej multaj lingve spertaj kaj interesataj esperantistoj povu helpi la Lingvan Komitaton per konsiloj aŭ kritikoj antaŭ la definitiva voĉdono, mi opinias necesa la represon de la nova vortlisto en laŭeble multaj Esperanto-gazetoj.

Tre prave s-o Prof. GROSJEAN-MAUPIN avertas kontraŭ la senlima kaj senkritika kreado de novaj vortoj. Al liaj argumentoj mi aldonas la atentigon al tio, ke Esperanto estas kaj estu lingvo ne nur por plimulplaj kleraj eŭropanoj, sed ankaŭ por nekleruloj, por grandaj popolamasoj kaj precipe ankaŭ por azianoj kaj afrikanoj, kiuj ne konas eŭropajn lingvojn. Por ili la lingvo devas resti facile lernebla kaj uzebla.

Tute subtenante la bonegan proponon de s-o Prof. GROSJEAN-MAUPIN, ke la aŭtoroj antaŭ la presigo de siaj verkoj prezentu al la Akademio liston de la novaj vortoj, kiujn uzi ili intencas, mi krome proponas, ke la Akademia Sekcio pri la Komuna Vortaro sisteme kolektu kaj science ekzameni la neoficialajn vortojn en la jam presitaj verkoj kaj publikigu kontinue ekspertizojn pri la rekomendinda aŭ neuzinda de tiaj vortoj. Tio estos ne nur valora helpo por la Esperanto-verkantoj, sed ankaŭ tre utila antaŭlaboro por estontaj Oficialaj Aldonoj al la Universala Vortaro.

Al la Raporto de la Sekcio por la Teknikaj Vortaroj mi povas aldoni atentigon al la lastjare aperinta Jura Vortaro (germana—esperanta) de D-ro Siegfried LIEBECK (Berlin). El la bezono de la juristoj pri klara diferencigo de diversaj juraj nocioj (konceptaĵoj) estiĝis kelkaj neologismoj, kiuj supozeble iom post iom penetros ankaŭ en la komunan vortaron (ekz. **mandi**, **pigno**, **presti**, **preskripto**, **mutuo**).

Verkante la Raporton pri la Gramatika Sekcio mi supozis, ke la Prezidanto de la Akademio jam en sia Raporto deklaras sian opinion pri la problemoj prezentitaj de la Arnhem-a Konferenco al la Akademio kaj ke li eventuale indikos la temojn unue traktendajn. Tio ne estis ebla. Sed espereble baldaŭa resaniĝo igos lin kapabla, sin okupi ankaŭ pri tio.

Intertempe aperis en „Lingva Kritiko“ (Vol. I N-ro 5) detala artikolo pri „La »problemo« ata—ita“ de JUNG. Prave li diras:

La Esperanto-gramatiko estas simpla kaj logika. Do, verdire, ne ekzistas „problemoj“ en la Esperanto-gramatiko. Sed imitado de nacilingvaj kutimoj aŭ sofisma hiperlogikeco ofte malsimpligas ĝin, kondukas al miskomprenoj, eĉ eraroj, kaj kreas la „problemon“.

D-ro Walter LIPPMANN (Leipzig).

## Raporto de la Direktoro de la Gramatika Sekcio

Altestimata Sinjoro Prezidanto!

### I.

En repensado al la pasinta jaro nin okupas antaŭ ĉio sentoj de profunda funebro pro la foriro de nia kara prezidanto: Profesoro CART. Dum multaj jaroj li per valoraj stimuloj kaj konsiloj akcelis ankaŭ la laborojn de la Gramatika Sekcio. Grandanombre leteroj kaj cirkuleroj atestas lian preskaŭ pasian intereson pri ĉiuj problemoj de nia lingvo, lian ampleksan scion kaj lian praktikan saĝecon. Ni memoras lin kun sincera admiro kaj granda dankemo.

### II.

Sajnas ke la intereso pri lingvaj aferoj plivigliĝis en la lasta tempo. Tion mi povis konkludi ne nur el mia ampleksa korespondo pri gramatikaĵoj, estigita per demandoj el multaj diversaj landoj, sed ankaŭ el la apero de granda nombro da tiatemaj libroj kaj artikoloj, el la fondo de speciale prilingvaj gazetoj kaj precipe el la okazigo de Lingva Konferenco en Arnhem je Pasko 1932.

Post prilingvaj paroladoj kaj diskutoj ĉi tiu Konferenco akceptis rezolucion (*Esperanto* 1932 p. 96; *Heroldo de Esperanto* 669 p. 1), el kiu jenaj paragrafoj koncernas la Gramatikan Sekcion de la Akademio:

„7. La Konferenco petas la Akademion, repreni la studon de la problemoj pri vortfarado sur la bazo de la laboroj, faritaj de la tiama komisiono SAUSSURE-HÖVELER-CART kaj fine solvu la demandojn pri la gramatika karaktero de la vortradikoj en la senco esprimita de la tiama Saussuraj raportoj.

8. La Konferenco petas la Akademion esplori la demandojn pri korekta uzado de la participoj kaj speciale atenti la nekorektan uzadon de formoj kun **-ita** anstataŭ la formoj kun **-ata**.

9. La Konferenco petas la Akademion, ke ĝi fiksu regularon pri la aplikado de la interpunkcio, pri la uzado de grandliteroj kaj pri la plej oftaj mallongigoj.

10. La Konferenco petas la Akademion, ke ĝi publikigu klarigon pri la ĝusta uzado de la prepozicioj, aparte pri **po** kaj **de**.“

Supoze ke vi, sinjoro Prezidanto, konsentas, ke la Akademio konsideru tiujn petojn de la Arnhem-a Konferenco, mi raportos pri la diritaj demandoj post konsultado de la Lingva-Komitatanoj. Tial mi jam nun petas ĉi tiujn kaj precipe la Akademianojn skribi al mi siajn opiniojn aŭ sendi al mi la rezultaĵojn de siaj studoj pri la supre nomitaj temoj. (Pri ĉiu sur apartaj folioj!)

La jenaj rimarkigoj kaj fontindikoj plifaciligu la esploron:

Al 7: La materialon pri la nomitaj „laboroj de la tiama komisiono SAUSSURE-HÖVELER-CART“ oni trovas en la *Oficiala Gazeto Esperantista* (OGE).

DE SAUSSURE (ANTIDO) publikigis en Aŭgusto 1910-a en la *Internacia Scienca Revuo* artikolon kaj poste libreton pri „La logika bazo de la vortformado (vortfarado) en Esperanto“ kaj prezentis sian laboron al la Akademio (OGE III p. 111).

BOIRAC kolektinte la opiniojn de la Akademianoj faris Raporton, kies konkludoj estis aprobitaj de la Akademio (OGE III p. 327).

Por plua ekzameno de la tuta demando la Akademio formis specialan komitaton (OGE IV p. 227). Ĉi tiu „Komisio pri derivado“, poste nomita: „Komisio(n)o pri vortfarado“ kun DE SAUSSURE kiel pre-

zidanto studis diversajn teoriojn (OGE V p. 57) kaj prezentis Raporton (OGE V p. 204, 208), kiun la Akademio kaj la L. K. akceptis (OGE V p. 271).

La teksto oficiale akceptita havas du partojn:

1. Vortfarado fondita sur la logika kaj senpera konstruo de ĉiu aparta vorto. Malaprobado de „reguloj de derivado“.

2. Principoj de neceso kaj de sufiĉo kiel logika bazo de la vortfarado.

Diferenco inter la vidpunktoj de HÖVELER (ĈEFEC „La elementoj kaj la vortfarado“, „Pluaj argumentoj“, „La fina argumento“) kaj DE SAUSSURE („La construction logique des mots en Esperanto“, „Resumo de la teorio de ANTIDO“, „ANTIDO, n-ro 2, Teoria ekzameno de la lingvo Esperanto“, „Principes logiques de la formation des mots“) igis ĉi tiun opinion necesan pluan ekzamenon de la du vortfarado-principoj (OGE VI pĝ. 23) kaj antaŭ ĉio de lia propono „koncerne la difinon de la gramatikaj finaĵoj: -o, -a, -i, -e“. Li raportis pri tio (OGE VII p. 18), sed „la Akademio ne opiniis lian proponon tuj akceptebla kaj deziris pluan esploron de la demando, antaŭ ol submeti lian proponon al la voĉdonado de la L. K.“ (OGE VII p. 20).

DE SAUSSURE ankoraŭ aperigis „La vortteorio en Esperanto“, „Fundamentaj reguloj de la vort-teorio en Esperanto“ kaj „La vortstrukturo en Esperanto“. HÖVELER mortis. La Akademio ne denove okupis sin pri tiuj temoj, sed diversaj aŭtoroj ankoraŭ traktis ilin, ekz. PANEL („Studo pri la vortfarado de Esperanto“), FRUICIER („La esperanta vortfarado“), FAUVART-BASTOUL („Pri la gramatika specifiĉeco de la fundamentaj radikoj“), AYMONIER („Essai sur la dérivation comparée dans les langues naturelles et artificielles“), WÜSTER („La tri fundamentaj reguladoj“ en Esperanto Triumfonta 1921, 23. 10.—13. 11.), „La oficiala radikaro“, „Vort-strukturo“ en Germana Esperantisto n-ro 222 p. 44, Aprilo 1917), KALOCSAY („Lingvo Stilo Formo“ p. 7).

Al 8: Kio estas „la demando pri korekta uzado de la participoj“? Ĉu en tio estas iuj problemoj? Por la anoj de kelkaj nacioj eble ne estas tute facilaj la uzo de la participo en frazoj kiaj: mi vidis ilin kurantaj, restu sidanta, ne revidinte sian patron, li mortis, la evito de absoluta participo (La knabo manĝinte la patrino al li diris . . .) kaj la diferencigo inter ekz. ama kaj amanta, escepte kaj esceptinte. Sed — ĉu tion la Akademio esploru?

La speciale nomita demando: ĉu -ita, ĉu -ata? iĝis kvazaŭ-problemo per tio, ke multaj naciaj lingvoj ne havas diferencon inter la formoj por ekz. amata kaj amita kaj per tio, ke D-ro ZAMENHOF kelkloke ne tute ekzakte diferencigis, ĉu la ago en la decida momento estas, estis aŭ estos jam farita, ĉu ankoraŭ farata. Eble ankaŭ estiĝis iom da konfuzo per la neĝustaj reguloj en la „Commentaire sur la grammaire Esperanto“ (p. 46—47) de DE BEAUFONT, kiu ludis gravan rolon en la t. n. franca periodo. Fakte ne estas malfacile trovi la ĝustan formon. Ĝi rezultas el simpla konstato de la efektiva daŭro de la ago. (-ata, se daŭranta, -ita, se finita.)

Pri participoj interalie en Esperanto-Praktiko 1927 p. 108; 1929 p. 26, 108, 128, 143, 159; 1931 p. 61, 95. Pri -ata aŭ -ita interalie: KALOCSAY en Literatura Mondo 1925 p. antaŭ 105, en Lingvo Stilo Formo p. 83; JUNG en Heroldo de Esperanto 503 p. 2.

Al 9: a) Pri interpunkcio D-ro ZAMENHOF esprimis sian opinion en Lingva Respondo (Pl. Kol. p. 21): „La reguloj pri la uzado de la interpunkcioj estas en nia lingvo pli-malpli tiaj samaj, kiel en ĉiuj

aliaj lingvoj; sekve ĉiu povas uzadi la interpunkciojn tiel, kiel li uzas ilin en sia nacia lingvo. Estas vere, ke en diversaj detaloj la uzado de la interpunkcioj estas malegala en diversaj lingvoj; sed ĉar la objekto ne estas tre grava, tial ni pensas, ke ne venis ankoraŭ la tempo por difini . . . severajn regulojn por tiuj ĉi detaloj.“ De tiam pasis preskaŭ 40 jaroj. Eble nun estos utile kaj ne tro malfacile, eltiri kelkajn praktikajn regulojn el la interpunkciaj kutimoj en la modela Esperanto-literaturo. (Komparu STAMATIADIS, Nova Gramatika Libro p. 81; AYMONIER, Grammaire complète p. 161; VELTEN, Ausführliche Grammatik p. 186; FRUICIER, Esperanta Sintakso Regulo 240, Komplete Gramatiko p. 73 k. a.)

b) La uzadon de grandliteroj mi detale traktis en mia Raporto de la jaro 1928 (Of. Dokumentaro, 20-a Univ. Kongreso de E. Antwerpen 1928 p. 111). Ne ricevinte iun neaprobajn kritikojn pri tiu disertacio, mi supozas, ke ĝi povos servi kiel bazo por la fiksado de reguloj. (Komparu ankaŭ STOJAN, La uzo de grandliteroj en Esperanto 1924 p. 55; CHRISTALLER, La majuskloj kaj Esperanto en Esperanto-Mondo N-ro 1 p. 6.)

c) Listojn de plej oftaj mallongigoj oni trovas en kelkaj instrulibro. Studindaj estas interalie jenaj demandoj: Kiu el la diversaj metodoj de mallongigo estas ĝenerale preferinda (1. Dr. 2. D-ro 3. D-o 4. Dro 5. D-ro 6. Prof. 7. k. t. p. 8. ktp. 9. k (= kaj) 10. &, %, § 11. GM, gM, Kĉ, Kĉ, kĉ)? Ĉu s-o (s-ino), ĉu s-ro (s-rino)? Ĉu D-ro de fil.? D-ro fil.? Dr. phil.? Ph. D.? Ĉu Esp-o? E-o? E? Ĉu oficiale permeseblaj estas mallongigoj kiaj: aŭt(omobilo), kin(ematografo), (omni)buso, taks(ametra aŭtomobilo)(l-iakro), fot(ografo)?

Al 10: Kvankam negrava pro sia malofteco, la vorto po havas verajn problemojn en si. Ĉu ĝi estas nur prepozicio, ĉu nur adverbo, ĉu jen ĉi tio, jen tio? Kiujn diversajn signifojn aŭ funkciojn ĝi havas? Ĉu ĝi povas esti uzata ĉe la subjekto de propozicio (Po du infanoj ricevis unu manpleno da nuksoj), ĉu kun akuzativo ĉe la rekta komplemento (La infanoj ricevis po du pomojn)? Diferenco inter po kaj -op-? Ĉu korektaj: 50 km po horo aŭ pohore? Li fordonis la monon po plenaj manoj? Du poŝtmarkoj por 10 centimoj — por po 10 centimoj — po 10 centimoj? Materialon oni trovas interalie en: Lingvaj Respondoj (Pl. Kol. p. 40, 74); LIPPMANN, Dr. Zamenhofs Sprachliche Gutachten 72, 73; Bulteno de E. L. A. Aprilo 1914 p. 64; Esperanto-Praktiko 1929 p. 145; OGE p. 230 (HÖVELER); Germana Esperantisto 1926 p. 41, 77 (BEHRENDT); WÜSTER, Die Verhältniswörter des Esperanto 6.3; Plena Vortaro de SAT. p. 374.

La korekta uzado de la prepozicio de apenaŭ prezentas konsiderindajn malfacilaĵojn al sperta esperantisto. Komencintoj eble eraras en la elekto inter da kaj de post vortoj de mezuro aŭ inter de kaj per post pasivaj verboformoj. Ili devas lerni, ke en kelkaj specialaj kazoj oni preferu al, en aliaj kazoj for de, de post, de antaŭ, de sur k. t. p. Sed pri tio eble jam sufiĉe informas la naciaj kaj internaciaj gramatikoj de Esperanto kaj la Lingvaj Respondoj (Pl. Kol. p. 72, 73). Krome oni trovas abundan materialon interalie en la „Kelkaj notetoj pri la uzado de la prepozicioj“ de EG-GLINGTON (OGE III p. 263, 355; Esperanto-Praktiko 1930 p. 94, 108, 134, 183; 1931 p. 15, 46, 63, 110, 133, 149, 167); HÖVELER, La signifo kaj la uzo de la prepozicioj en E. (OGE III p. 213, 223); BULTHUIS, Pri la prepozicioj (Holanda Pioniro 1917 p. 34, 35); BEHRENDT, Anwendung des Wortes „da“ (Germana Esperantisto 1927 p. 50); LOBUT, Ĉu ni rajtas misuzi la prepozicion DE? (Esperanto-Praktiko 1923 p. 51); WÜSTER, Enciklopedia Vortaro p. 146; Plena Vortaro de SAT. p. 56.

Pro teknikaj kaŭzoj eble estos preferinde, ke la Akademio esploru ne tuj ĉiujn demandojn nomitajn de la Lingva Konferenco, sed nur unu aŭ du kaj post decidoj pri ĉi tiuj iom post iom la aliajn. Se ankaŭ vi opinias tion, mi petas, ke vi bonvolu elekti tiujn temojn, kiujn vi rigardas kiel unuavice prilaborindajn.

### III.

Novaj gazetoj:

Kiel monata aldono al **Heroldo de Esperanto** aperas „**Lingva Kritiko. Studoj kaj notoj pri gramatiko, vortaro kaj stilo.**“ Rilate al la gramatiko ĝia programo deklaras: „Aŭskulti kaj kritike ekzameni la opiniojn de diverslingvaj kompetentuloj, fari niajn konkludojn kaj, fine, kiel rezulton de nia laboro, prezenti al la uzantoj de Esperanto gramatikon, kiu donu informon kaj konsilon en plejeble multaj dubaj kazoj, — jen la tasko de la gramatika parto de nia revuo.“

La Internacia Cseh-Instituto de Esperanto en Den Haag eldonas monatan „Gazeton, kiu instruas kaj amuzas“: „**La Praktiko**“. Ĝi enhavas „praktikajn gramatikajn lecionojn“ kaj donas prilingvajn informojn sub la rubrikoj „La Redakcio respondas“ kaj „Eraroj“.

Jam en Aprilo 1930 ekaperis „**Esperantologio**“, „gazeto privata“, kiu publikigas verkojn pri esperantologio nur de Naokazu KAWASAKI kaj Joŝicugu OKAMOTO. La tekstoj estas japanlingvaj.

### IV.

Novaj libroj gramatikaj:

K. KALOCSAY, **Lingvo Stilo Formo. Studoj.** (En la libro estas artikoloj pri la esperanta vortfarado, la evoluo de nia poezia lingvo, la rimo, elparolo kaj ritmo en Esperanto kaj la difina artikolo, iu kaj ia, kvazaŭ, duoblaj konsonantoj, konjunktivo, vortsekvo, ata kaj ita, kunmetitaj verboformoj, edziĝi, enamigi, mirinda, kutimi, de, depost, ekde kaj ĉi.)

Prof. Dr. GÖHL, **Ausführliche Sprachlehre des Esperanto. Lehr- und Nachschlagebuch für Fortgeschrittene.** Herausgegeben von Dr. med. C. RENKEN und Friedrich ELLERSIEK.

E. DREZEN, **Skizoj pri teorio de Esperanto (Oĉerki teorii esperanto).** En lingvoj rusa kaj esperanta. Esperanto-Slosilo aperis por la lingvoj hungara, japana, kroata, romanĉa (ladina) kaj ukraina.

L. KRYSTA, **Pri la prononcado de Esperanto.**

Internacia Sekretariaro de la Landaj Proletaj Esperantaj Lingvo-Komisionoj (ISLK) eldonis broŝuron „**Al la Nova Etapo**“, kiu enhavas artikolojn tuŝantajn ankaŭ gramatikajn aferojn (ANDREJEV, **Esperanto kaj dialektiko** k. a.).

### V.

Gramatikaj artikoloj en Esperanto-gazetoj:

En **Esperanto**: PRIVAT, Sento kaj logiko (1931 p. 9); POKORNY, La sufikso „iĝ“ kiel anstataŭanto de la pasiva formo (1931 p. 74); BAILEY, Pri la uzado de iĝ anstataŭ pasivo (1931 p. 148).

En **Esperanto-Praktiko** (1931): BEHRENDT, Pri la uzo de „da“ (p. 13); Fleksi-anstataŭa vortkunmetado (p. 43); Simplaj kaj nesimplaj vortoj (p. 30); Demandoj kaj respondoj pri oni, onia, refleksiva pronomo, adjektivo apartenanta al pluraj substantivoj, mies, vies, lies laŭ ies, kies . . . (p. 31—32), nominativo kaj akuzativo de la aktiva participo (predikata) (p. 79), verbo kunmetita kun prepozicio (plursenceco de kun), ekstremo da (de) feliĉo, nenio ol (p. 94); Novepoka verkado (pri simplaj verbigoj de radikoj substantivaj,

adjektivaj kaj adverboj kaj nekutimaj vortkunmetaĵoj) (p. 28, 75, 96); juĝoj pri tio de CHRISTALLER, DUNCAN kaj aliaj (p. 75—79); MINOR, Pri la finaĵo -n esprimanta la direkton (p. 29); HIPSLEY, Pri la elparolado kaj prononcado (p. 44); Participoj (p. 95); POKORNY kaj REICHEL, Pri la sufikso -iĝ- (p. 45, 64); EGGLETON, Kelkaj notetoj pri la uzado de la prepozicioj (Da kaj de) kun rimarkigoj de BEHRENDT (p. 15, 46, 63, 110, 133, 149, 167); REEPS, Pri la konjugacio (p. 615); EKO, Tiom kaj tiel antaŭ adjektivaj kaj adverboj esprimantaj kvanton . . . (p. 134); Disigo de vortoj ĉe la fino de linio (p. 134).

En **Heroldo de Esperanto**: ZAMBRZYCKI, Adjektivaj -a, -ema, -eca (604 p. 7); BOUCON, Pri la verba adjektivo (609 p. 3); P. B., ROLLET DE L'ISLE, Pri la verba adjektivo (617 p. 8); BUTIN, Lingva babilajo (i. a. pri verboj el adjektivaj) (625 p. 8); HAMMER, Centjaro kaj jarcento (635 p. 7); TRARBACH, Pri vortfarado per la finiĝo -i (637 p. 3).

En **Lingva Kritiko** Vol. I: TAKAĤASI, Pri la uzado de „kio“ kiel relativo (N-o 1); pri la sama AVRIL (N-o 2) kaj GROSJEAN-MAUPIN (N-o 3); Lingvaj demandoj kaj respondoj pri movi, movigi, moviĝi, de antaŭ, de post, refleksivo, pluralo post duono, kio antaŭ kaj, antaŭ ol — antaŭ kiam, -ata, -ita, absoluta participo, akuzativo anstataŭ prepozicio kun nominativo, se — ĉu (N-oj 2 kaj 4), komparativo sen komparo, direkta -n, persona pronomo por infano kaj homo, post ol, imperativo (kun postmetita pronomo) (N-o 4) SCHATAT, Reguloj kaj formuloj (pri vortfarado); BAILEY, Pri la prepozicio „da“; Pri „kelkaj“ kaj „kelke da“; SCHATAT, Relativ-pronomo „kio“; DE MAERTELAERE, Pri karesa sufikso (N-o 2); BÜNEMANN, Pri la montrado de la kazoj; La interliga streko (N-o 3); ROLLET DE L'ISLE, Pri la prepozicio „de“; SCHATAT, Scipovi (N-o 4).

En **La Lernanto** 6-a Jaro: YOUNG, Memorfrazoj por la korelativoj (N-o 2 p. 2); LIPPMANN, Ĉu ol post sama? (N-o 3 p. 2); POKORNY, pri trouzo de la sufikso -iĝ- (N-o 5 p. 2); L. L., Pri la apliko de la adverbo „ne“ (N-o 10 p. 3); GROSJEAN-MAUPIN, Akuzativo post netransitivaj verboj, kosti, mirigi, lerniĝi (N-o 11 p. 3); L. L., Kio aŭ kiu estas Petro? (N-o 12 p. 2).

En **The British Esperantist**: BUTLER, Pedanteco (Pri domaĝi, simpatii, plaĉi, ŝati, po) (N-o 326 p. 198).

En **Literatura Mondo** 1931: KALOCSAY, THOMSON, NYLEN, BULTHUIS, Esperanta elparolado (p. 14, 121, 197, 227); KALOCSAY, La esperanta rimo (p. 42, 63); LIPPMANN, Gramatiko kaj literaturo (p. 203).

En **Vegetarano** XIV n-o 3 p. 32: Akuzativo post ĝis.

En **Kristana Revuo** plu aperis Lingvaj Notoj pri „La Malnova Testamento“ de BUTLER.

En **Ondo de Daŭgava**: MAZZOLINI, Misuzado de demanda signo (1931 p. 103).

En **Rivista Italiana di Esperanto**: MAZZOLINI, Ankorau pri Fundamenta Krestomatio (1931 p. 66 k. a.).

En **La Revuo Orienta**: TAKAĤASI, Saikidaimeisi ni kansuru icimondai (Unu demando pri refleksiva pronomo). Diskuto inter TAKAĤASI kaj LIPPMANN pri kelkaj demandoj koncernantaj la refleksivan pronomon, parte en Esperanto, parte en japana lingvo (1931 N-o 6 p. 173).

En **La Nova Etapo** (Kajero unua 1932): WÜSTER, Ĉirkaŭ la teorio de Esperanto A. Per kio sufikso diferencas de radikoj? B. Egalajo ag = i. (p. 32); JIRKOV, En Esperanto nur radikoj! (p. 34).

Mi salutas vin, tre estimata Sinjoro Prezidanto, kun plej alta respekto.

D-ro Walter LIPPMANN.

Leipzig, la 18-an de Junio 1932.